



REGISTROLIBRO DE LA MONDCIVITANOJ

66 boulevard Vincent Auriol, 75013 PARIS, Francio

Øenerala Asembleo de la 17a de aprilo 2004

en 10 rue des Fossés-St-Jacques, 75005 PARIS, Francio

PROKOKOLO

Æeestas :

Registrolibra Estraro :

Daniel Durand, Prezidanto
Liliane Metz-Krencker, Øenerala Sekretariino
Basile Ginger, Kasisto

Administra Konsilantaro :

Geneviève Charpentier
Peter Davidse
René Marlin
Claudius Schauffler

Membroj de Registrolibro

Bernard J. Henry
Eric Sauvat (Sirio)

Ekskuzitaj, kaj sendintaj rajtigilon :

Paul Berendsen, Amel Djemai, Souleymane Drabo, Ursula Grattapaglia, Inge Grzyb, Masaji Ie, Claude Jousseau, Karl Kpodo, Joël Luguern, Landing Niassy, Barthold Olbers, Leo Rebello, Chantal Roulin, Aimé Ruzuba Bizimwa, Abdillah Saandi, Dorothea Sheasby, Jean Verstraeten, Christa Werner.

Kromaj æeestantoj :

Elisabeth Barbay, Henri Cainaud (Delegito al la Kongreso de la Popoloj), Odile Durand, Michaël Ehinger, Louis Gohin, Georges Krassovsky, Jean-Michel Richard, Mangoné Seck, Hermine Togbé-Olory, Thierry Toulon, Jean-Marc Zan (Sekretario de la Kongreso de la Popoloj).

Kunsida prezidanto : Daniel Durand
kundisa sekretario : Bernard J. Henry

1. La cirkonstancoj de la asembleo (agada raporto)

Daniel Durand klarigas, ke la æeestantaj responsantoj estas æefe Eýropaj, æar la responsantoj el la cetera mondo, interalie de Afriko, pli kaj pli malfacile sukcesas ricevi vizojn. Unuflanke la politiko pri kontrolo de la landlimoj de la spaco Schengen kondukas al la kreado de "Eýropa Fortreso", kaj aliflanke la aýtoritatoj de la diversaj eýropajn landoj suspektas la Mondcivitanojn kuraøigi neleøan migradon, kio kompreneble malveras. El tio rezultas, ekzemple, ke niaj kolegoj el Senegalio, Burkinio kaj Aløerio vidis siajn klopodojn por atingi nin nuligitaj. Ni nepre batalos kontraý tiun maljustecon per niaj plenaj fortoj.

Mondo kun ðanøantaj markoj.

La lasta Øenerala Asembleo, æiun duan jaron, okazis en 2002 en æambro proksima al UNESKO-sidejo. Laý internacia skalo, ni travivis la periodon, kiu sekvis la atencojn de la 11a septembro 2001 en Usono kaj la milito en Afganio, dum prepariøis la milito, kio poste okazis en Irako. Dum la unua ricevis larøan konsenton, la dua starigis multajn protestojn pro sia malleøa karaktero rilate al la internacia juro.

Tiuj du jaroj vidis ankaý la progreson de la mondaj socialaj forumoj, en 2002 kaj 2003 en Porto Alegre (Brazilo) kaj æijare en Mumbai (Hindio), al kiuj

aldonighas la Eýropaj forumoj de Florenco kaj de St-Denis - Parizo.

La Mondcivitanoj flegas siajn vundojn

Tiuj jaroj vidis ankaý la bedaýrindan forpason de Renée Marchand, kiuj lasis nin en 2002. Almenaý ekde la forpaso de ðia edzo Guy en 1993, Renée per sia prpora agadforto portis la Registrolibron de la Mondcivitanoj, same kiel la Kongreso de la Popoloj al kiu ði estis unue Delegito antaý ol rezigni por fariøi øia Øenerala Sekretariino. Tiu malapero estis por ni æiuj forta bato, kiun ni tamen superis por denove plu agadi.

En septembro 2002 okazis la Studaj tagoj de Dabo, en kiujn estis invititaj la registraj responsantoj el Francio, Svislando, Germanio kaj Luksemburgio, same kiel la Esperantista Centro. En tiu okazo ni faris øeneralan konstaton de la tutmondismo kaj difinis la bazojn de kio fariøos, en marto 2003 en Diýono, la kunveno de la Subtena Komitato por la Kongreso de la Popoloj. Dum tiu kunveno Roger Winterhalter plene aliøis al nia laborgrupo øis fariøi dum la Plena Kunsido de la Kongreso de la Popoloj kunvokita en lasta oktobro, Prezidanto de la asembleo elektita de la tutmondistoj, al kiu aldoniøis Konsultiøa Asembleo. La protokoloj de tiuj kunvenoj estas haveblaj laý simpla peto. Kelkaj haveblas el Interreto : <http://www.recim.org>.

Intertempe, en majo 2003, la debato pri tutmondista strategio evidentigis certan spirmankon de la tutmondistaj movadoj en Francio kaj en Norda Ameriko. La Tutmondista Konstanta Komitato, animata de Jerry Bourgeois kaj Michel Forestier, penas por mobilizi, same kiel ĉia anglalingva similaĵo, la Committee for a Democratic World Government, kiu ekkrizas.

Siaflanke la Registrolibron ĉefe plenumis strukturigan laboron, kaj ne homamasan. Post la malapero de Renée Marchand, tiu bezono mem altrudiĉis. Nuntempe ĉar ni sukcesis restarigi tion, kio malfirmiĉis, la Registrolibro povas denove plenumi sian veran mision : nombri tiujn, kiuj tra la mondo, deziras supernacian demokration. Ni ekzistas ekster ĉiuj politikaj partioj, ĉiuj religioj, ĉiuj filozofiaj fluoj ; la Registrolibro estas teknika organizaĵo.

Kion opinias la Mondcivitanoj pri io ?

La precizigo estas grava, ĉar oni daŭre aŭdas tiun timigan demandon : "Kio estas la opinio de la Mondcivitanoj pri io ?" Tio pri multaj temoj. La nura respondo, kiun ni povas fari, kvankam unuainforme elreviga, tamen estas la nura ebla, kaj precipe la nura logika. Pro sia naturo, la Registrolibro ne povas esprimi opiniojn.

Tamen antaŭ nelonge, pro tre eksterordinara okazo, ĉi aliĉis al deklaro. Dum lasta februaro, pro la peto de la Transnacia Radikala Partio de la Itala Marko Pannella, la Registrolibro subskribis peticion postulantan, ke Ĉeĉenio, fordetruta de pli ol dekjara milito, estu lokita sur la administrado de Unuiĉinta Naciaro, same kiel tio okazis en Kosovo.

2. KIO NE ESTAS REGISTROLIBRO

Bedaŭrinde ni devas priplori certan nombron da kutimaj ideoj, kiuj cirkulas pri la Registrolibro - almenaŭ ĉe tiuj, kiuj kuraĉas paroli.

Interalie necesas firme rediri, ke la Registrolibro ne estas :

- politika organizaĵo : kiel Ĵus dirite, la Mondcivitana Registrolibro ne ekzistas por decidiĉi pri tiu ĉi aŭ tiu temo. Tio estas la prerogativo kaj ankaŭ la devo de la Kongreso de la Popoloj. Tamen ĉiu Civitano de la Mondo rajtas decidiĉi kiel li deziras, kondiĉe, ke li faru tion je individua nivelo ;
- "Eŭropa organizaĵo" : Pro evidentaj kialoj ligitaj al la historio de ĉia kreado, La Mondcivitana Registrolibro sidas en Parizo. Sed tio neniel signifas, ke ĉi estas Eŭropa organizaĵo, kiu provas altrudi eŭropajn konceptojn en la sudajn landojn. La komenca Registrolibra koncepto, kiu plu validas, estis la kreado de spaco de monda demokratio el unika Registrolibro de ĉiuj civitanoj de la mondo. Pro esenco, la Registrolibro estis kaj daŭre estas transnacia ;
- Vojaĉagentejo : male de ĉajna penso, interalie en Afriko, la Registrolibro ofertas neniun eblecon elturniĉi el la tro severaj politikoj pri liverado de vizoj. Alimaniere dirite, se oni pensas : "fariĉante Civitano de la Mondo, mi povos

vojaĉi", oni sin lulas per iluzioj. Pri tio atestas la malfacilecoj, kiujn Ĵus havis niaj afrikaj kunlaborantoj por viziti nin ekde la validiĉo de la spaco "Schengen", kiu inkluzivas Francion, lando gastiganta la sidejon de Registrolibro.

La Agada raporto estas unuvoĉe adoptita, krom la kolektiva sindeteno de la estraranoj.

3. FINANCA RAPORTO

Laŭ peto de Basile Ginger, kasisto, Daniel Durand legas la financon raporton (v. anekson).

Rimarkinde : la linioj "Kongreso de la Popoloj" en la ekzercio 2003 entenas la enspezojn kaj elspezojn faritajn pro la Plena Kunveno de oktobro 2003.

La financa raporto estas unuvoĉe adoptita.

4. Agada raporto de la Registrocentroj kaj korespondantoj.

Nun la Registrolibro de la Mondcivitanoj disponas pri 30 korespondantoj, kiuj estas homoj individue laborantaj, dum la Registrocentroj posedas strukturon el asocia modelo.

Alĉerio : Amel Djemai, Korespondantino en Chercell pasintjare suferis pro gravaj sanaj problemoj, kiuj malhelpis ĉin normale plenumi siajn funkciojn. Ofte Amel devas rifuzi enregistri eventualajn mond-civitanojn, kies vera celo estas la havigo de vizo al Francio. ĉi mem provis kunveni kun ni hodiaŭ, sed vane ;

Brazilo : Ursula Grattapablia, Korespondantino en Alto Paraiso de Goias, sendas la ni la jenan mesaĉon : " *Mi deziras la necesan sukceson al viaj gigantaj klopodoj realigi la "revon" de multaj, kiuj nenion au nur malmulte faras por ke la mondo finfine konsciiĉas pri niaj komunaj problemoj.*

Kiel ĉajnas, la mondo bezonas figurojn kiel Bin Laden kaj Sharon, kiel Bush kaj ...aliaj por kompreni la konceptojn de la mond-civitanoj!!!

Mi estas certa, ke ni vivas gravan historian momenton, kiam nian destinon decidus ne ni mem sed "dubindaj figuroj". Certe la faktoj apogas niajn ideojn de mond-civitanismo kaj ni devas nepre rezisti kaj daŭre klopodi. Sed mi same konsentas, ke ni nepre devas krei novajn strategiojn, kiel prave nia organizo laste startis. Mi ne sendas mian agadraporton, pardonu!, ĉar mi konsideras, ke ni unue devas havi pli klarajn ideojn por disvastigi niajn ideojn. En Brazilo, kie 33 % de la homoj vivas en fakta mizero, mi povus alparoli ege malgrandan grupon, ĉar inter la restantaj, malmultaj havas tempon por zorgi internacian justecon. Tamen mi daŭre konsideras grava havi rilatojn kun UNESCO, iasence pro la aŭtomata prestiĉo - kvankam mi konsentas, ke UN jam estas sensignifa nun."

Burkinio : Souleymane Drabo, korespondanto, bone laboras kaj deziras krei Registrocentron ;

Kamerunio : ni daŭre bedaŭras la "malaperon" de Peter M'Bunta", arestita de la polico sen konata kialo dum tutmondista kunveno, kaj por kiu aŭj niaj klopodoj malsukcesis ;

Kanado : Dorothea Sheasby, direktorino de la Registrocentro, suferis multajn problemojn. Dorothea ne bone fartas, krome ne havanta vicprezidanton al kiu ŝi povus delegi ; plej malfeliĉe la Registrocentra kasisto ŝus estis viktimo de veturila akcidento. En situacio de grava malkonsento kun siaj kunlaborantoj, la membro de la Registrocentra Konsilantaro Gunnar Tannis estis eksigita. Siaflanke Dorothea estis devigita elekti inter la Mondcivitana Registrolibro kaj la Association of World Citizens de Douglas Mattern, kiun ŝi intencis reprezenti en Kanado ; finfine Dorothea decidis resti kun ni ;

Ganao : Karl Kpodo enregistriĝis 11 homojn en 2003 kaj estas kandidato al la Administra Konsilantaro de Registrolibro ; li havas multajn projektojn, kiujn li esperas baldaŭ realigi ;

Hindio : Leo Rebello el Mumbai plurfoje informis nin pri sia projekto viziti nin sed vane. Li partoprenis en la Monda Sociala Forumo de Mumbai. Hodiaŭ li estas kandidato al la Administra Konsilantaro de Registrolibro ;

Japanio : Ni devas omaĝi la fidelecon de Masaji Ie, direktoro de la Registrocentro, kiu du aŭ trifoje jare eldonas informilon en angla kaj en japana ; aŝijare Mazaji Ie enregistris kvar homojn ;

Luksemburgio : Goulнора Soultanova, enoficigita kiel korespondantino dum la Studaj Tagoj de Dabo, rezignis pri sia funkcio pro la manko da intereso, kiun ŝi konstatis en Luksemburgio, kaj ankaŭ pro personaj kialoj ;

Maroko : Abdillah Saandi, Komorano kun 16 jara, fariĝis korespondanto en Fes ;

Kongio : La Registrocentro de Kalongo bone funkcias, realiginte 9 enregistraĵojn en 2003 ;

Senegalio : Roger Winterhalter renkontis Landing Niassy, korespondanto, komence de la jaro. Ankaŭ al li oni rifuzis vizon por veni kun ni. Landing havas la projekton baldaŭ konsistigi veran Registrocentron en Dakaro ;

Sirio : Eric Sauvat, aĉestanta, estas franco edzigita kun Siriano. En Sirio, kie Eric vivas duonjare, la loĝantaro ne aŭdacas engaĝiĝi. Ne helpas la manko de la Registrolibra decidiĝo pri la konflikto en okcidenta oriento, pli aparte pri la rajto de la palestina popolo disponi pri ptato ;

Svisio :

En **Romandio**, la Registrocentro kreita en 2002 ne multe havis eblecon realigi multajn enregistraĵojn. Ĝenerala kunveno estis organizita en septembro, sed venis nemultaj Civitanoj de la Mondo. Claudine Fischer partoprenis en la kunvenoj de Dabo (septembro 2002) kaj de Diĥono (marto 2003). La Registrolibra estraro renkontis la membrojn de la Romandia Registrocentro okaze de la kongreso de S.A.T.. Nova renkonto okazos en 2004 ;

En **germanlingva Svisio**, Claudius Schaffler estas Korespondanto de la Mondcivitana Registrolibro. Paralele la asocio Weltb rgerInnen der Schweiz, animata de Claudius Schaffler kaj de Michael Ehinger estas tre aktiva.  i manifestaciis kontraŭ la milito en Irako, iniciatis por postuli la translokigo de UN-sidejo de Novjorko al  enevo, kaj nun ser as organizi konferencon por la proklamado de tutmonda konstitucio...

Ĉar le tempo planita por la  enerala asembleo forfluis, la Prezidanto mallongigas la agadan raporton de la Registrocentroj kaj Korespondantoj, kaj anoncas decidon de la Estraro rilate al tiu problemo.

4. ADMINISTRA KONSILANTARO : LA BALOTADO

Estas vo donantaj kaj elekteblaj la membroj de Mondcivitana Registrolibro, tio estas : la Registrocentroj po 3 responsantoj, la Korespondantoj kaj la asociitaj membroj (volontuloj de Registrolibro). La balotado okazas per sekreta balotilo.

Rezulte de tiu balotado, estas elektitaj kun mandato  is la  enerala Asembleo de 2008 : Daniel Durand, Bernard J. Henry, Rolf Haegler, Karl Kpodo, Leo Rebello, Ursula Grattapaglia, Claudius Schaffler, Francesco d'Ingiullo, Jo l Luguern, Landing Niassy, Claude Jousseume, Ren  Marlin, Jean-Claude Loewinski, Venant Mudinga Mahugo.

Estraro

Daniel Durand, sola kandidato, estas unuvo e reelektita kiel prezidanto de la Registrolibro de la Mondcivitanoj. Li proponas, per simpla interkonsento, la jenajn elektojn sine de la Estraro :

- Vic-prezidantino : Genevi ve Charpentier ;
-  enerala Sekretariino : Liliane Metz-Krencker ;
- Kasisto : Peter Davidse.

Kunsida fermo je 15 h 00.

<http://www.recim.org>

JAROJ 2002 kaj 2003
en €

ENSPEZOJ			ELSPEZOJ		
	2002	2003		2002	2003
Individuaj kontribuoj	3 136,23	3 070,92	Sekretariado	2 180,00	2 300,00
Registrocentraj kontribuoj	291,76	520,82	Veturadoj	1 546,28	1 258,56
Kontribuo de UPF	2 744,09	2 744,10	Sekretariaj elspezoj	49,18	0,00
Kartoj liveritaj de RCM	500,78	1 034,62	Tradukadoj		10,00
Kartoj liveritaj de la centroj	1 769,00	1 702,00	Presado	365,51	1 462,01
Interrezoj	587,74	648,19	Poptmarkoj	401,80	419,05
Vendadoj	53,30	133,00	Telefono kaj Interreto	523,65	651,14
Kongreso de la Popoloj		623,00	Financaj kostoj	15,22	22,51
Repago de vitraĵo	628,32		Lokala kunproprieteco	782,34	528,23
			Refarado de la lokalo	3 750,50	6 972,56
			Impostoj, elektro...	1 042,91	806,68
			Aĝetoj	8,00	982,39
			Animadoj	259,00	618,19
			Diversaj (kunveneambr...	276,49	76,50
			Kongreso de la Popoloj		1 280,53
SUME	9 711,22	10 476,65	SUME	11 200,88	17 388,35
Jaraj rezultatoj	-1489,66	-6 911,70			

BILANCO je la 31.12.2003

CCP RCM	1 607,51
CN ĉparkonto	16 130,58
En kaso	429,45
SUME	18 167,54

Kontribuaĵoj de la centroj	2002	2003
Flandra Centro	25,00	30,50
Valona Centro		35,00
Esperanta Centro	93,76	5,00
Japana Centro	173,00	40,00
Kanada Centro		410,32
Franca Centro		(en 2004)
SUME	291,76	520,82

Cartes par les Centres	2002	2003
Japana Centro		124,00
Flandra Centro		44,50
Esperanta Centro		39,00
Franca Centro	1 342,00	1 494,50
CD- Kalonge Centro		(en 2004)
Kanada Centro	122,00	
Romanda Centro	305,00	
SUME	1 769,00	1 702,00

En 2002 : 66 kartoj estis liveritaj de la internacia Centro el kiuj 37 por la Registrolibraĵaj korespondantoj.

En 2003 : 147 kartoj estis liveritaj de la Internacia Centro el kiuj 40 por la Registrolibraĵaj korespondantoj.